Jarkunveno de Grupo Esperantista de Trondheim, 6an de marto 2023

ĉe Jardar E. kaj Judith P. Abrahamsen, Asbjørn Øverås veg 14 G

1. Aprobo de la kunvoko
La ĉeestantaro aprobis la kunvokon kvankam oni dissendis la tagordon nur hieraŭ. Pro la pandemio ne okazis jarkunveno pasintjare, kaj la hodiaŭa jarkunveno devas trakti dokumentojn por du jaroj.

2. Malfermo de la jarkunveno
La prezidanto malfermis la jarkunvenon.

3. Aprobo de la tagordo
La jarkunveno aprobis la tagordon.

4. Elekto de kunvena prezidanto, raportanto kaj 2 subskribontoj de la protokolo
Torstein Kvakland elektiĝis kiel kunvena prezidanto. Kiel raportanton oni elektis Jardar Eggesbø Abrahamsen. La protokolon subskribos Christian Fossen kaj Ulf Stenhaug.

5. Kombina jarraporto por 2021 kaj 2022
Oni kontrolis la jarraporton kaj aprobis ĝin.

6. Jarkalkuloj 2021 kaj 2022
Kasisto Ulf Stenhaug prezentis la jarkalkulojn. Ni tralegis la jarkalkulojn. Revizoro Bergny Dahl kontrolis la jarkalkulojn kaj trovis ilin en ordo. La jarkunveno aprobis la jarkalkulojn.

7. Elektoj
La elekta komitato tre rapide laboris, kaj subite proponis reelekton de ĉiuj. La jarkunveno reelektis ĉiujn:

Prezidanto:	Torstein Kvakland (reelekto)
Kasisto:	Ulf Stenhaug (reelekto)
Sekretario:	Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano:	Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto:	Christian Fossen (reelekto)

Revizoro: Bergny Dahl (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Jørgen G. Bosoni (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)

La jarkunveno decidis proponi reelekton de la elekta komitato, kaj poste la jarkunveno elektis laŭe:
Jørgen G. Bosoni (reelekto, kondiĉe ke li pagos kotizon) kaj Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)

8. Envenintaj proponoj
Neniu propono envenis.

9. Fermo de la jarkunveno
La prezidanto de GET volonte fermis la jarkunvenon.

Post la jarkunveno ni konversaciis pri la ĉiutaga vivo.

Ĉeestis 6 (kaj 2 infanoj).

Raportis: Jardar Eggesbø Abrahamsen

Subskribis: Christian Fossen Ulf Stenhaug

Styret på norsk

Under sak 7 på årsmøtet i Grupo Esperantista de Trondheim (Trondheim esperantoklubb) mån. 6.3.2023 vart dette styret valt:

Leiar: Torstein Kvakland
Kasserar: Ulf Stenhaug
Sekretær: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Styremedlem: Herman Ranes
Vara: Christian Fossen

Referent: Jardar Eggesbø Abrahamsen

Underskrivarar: Christian Fossen Ulf Stenhaug